

Arkadij STRUGACKIJ, Boris STRUGACKIJ

HELIKO SUR DEKLIVO



Moskvo
Eldonejo «Impeto»
2007

УДК 811.922
ББК 84P7-4Эсп
С87

Arkadij Strugackij, Boris Strugackij
Heliko sur deklivo

Tradukis Mikaelo Bronŝtejn
Pentristo Vjaĉeslav Te
Respondeca redaktoro Aleksandr Ŝevĉenko

Аркадий Стругацкий, Борис Стругацкий
С87 Улитка на склоне / Arkadij Strugackij, Boris
Strugackij. Heliko sur deklivo. На языке эспе-
ранто. М.: Импето, 2007. – 248 с.
ISBN 978-5-7161-0168-5

УДК 811.922
ББК 84P7-4Эсп

ISBN 978-5-7161-0168-5

© А. Стругацкий, Б. Стругацкий, 1992
© М. Bronŝtejn, traduko, 2007
© «Impeto», aranĝo, 2007

Kara leganto,

mi gratulas vin. Se vi havas en la manoj ĉi tiun li-
bron, bonvolu pretiĝi al ĝuplena legado. Certe, vi povus
antaŭsenti tion, se viajn manojn antaŭe trafis almenaŭ
unu el la ses romanoj de fratoj Strugackij, jam aperintaj
en Esperanto. Tiuokaze, vi jam klare imagas legindecon
de ĉiu ajn verko, kreita de Arkadij kaj Boris Strugackij,
la klasikuloj de rusia/sovetia sciencfikcia literaturo.

Tamen ĝuste por tiu ĉi libro mi devas fari averteton
surbaze de la persona sperto, la pli ol kvardekjara sper-
to de adoranto de Strugackij-verkoj. La «Helikon» oni
povas legi dumaniere – mi spertis ambaŭ. Eblas kon-
sumi ĝin unuglute, senpaŭze, ĝuante la intrigojn,
ridindaĵojn, absurdaĵojn, aludojn, time kaj admire kun-
vivante la sorton de la protagonistoj. Tiel mi konsumis
la libron en junaĝo, kiam ĉiu verko de fratoj Strugackij
influis mian humoron, samkiel forta alkoholaĵo. Tiaspe-
ca tralego, sendube estas plezurdonata, sed ja gvidanta
preter la esenco. Rilate al la «Heliko» la konkludo vali-
das oble; spertinta tion ĉe la dua, postdekjara legado,
mi rekomendas ke vi legu senhaste, penseme, meditante.

Ĉar la «Heliko», miaopinie, estas la plej abstrakteca
el inter la kreitaĵoj de fratoj Strugackij. Eble mem la
aŭtoroj estas farintaj tion ne intence, sed, ĉe atenta lego,
bildoj, eventoj kaj agoj de roluloj povas produkti en la
imago de leganto aron da diversaj konkludoj, eĉ kontraŭ-
diraj. Menciindas, ke la aŭtoroj kreis du variantojn por
la sama temo. La eventoj de la pli frua varianto, aperinta
sub titolo «Angoro», okazas sur la fikcia planedo Pan-
doro; laŭ mi tio grave simpligas la situacion, malprofite
simpligas. Verŝajne la aŭtoroj sentis tion, do, referinte la
romanon komplete, ili forigis ĉiajn menciojn pri ali-
planedeco de la eventoj.

Do ekzistas du mondoj – la Administracio kaj la Ar-
baro, respektive du protagonistoj – Perek kaj Kandid,
kuraĝaj, honestaj, puranimaj personoj. Certagrade sim-

planimaj – la aŭtoroj eĉ aludas tion per la nomo «Kandid», pruntita de Voltaire¹. Kaj ene de ĉiu el tiuj du mondoj, ĉirkaŭ la du protagonistoj bobelas vivo stranga, nekomprenbla aŭ neakceptebla por ili, agadas amaso da roluloj: primitivpensa oficistaĉo Domaroŝĉiner² kaj seksavide orgojla ŝoforo Tuzik, ruzeta filozofo Kriplokruro kaj ŝatinda babilema knabinjo Nava... Kio estas kio, kaj kio estas kiu? Kiu mondo estas pli bona, malpli riproĉinda? Ĉu la Administracio, memoriganta iaman sovetiecan ŝtatmaŝinon per sia stulta leĝaro kaj same stultaj provoj konkeri la arbaron, nu, se ne konkeri, do almenaŭ prifeki ĝin? Aŭ la Arbaro, plena da miraklaj estaĵoj, nekomprenblaj fenomenoj, filozofiemaj vilaĝanoj kaj iaj senkoraj partenogenezaj «gloramikinoj»? Ambaŭ protagonistoj – Kandid en la Arbaro kaj Perek en la Administracio – provas kompreni kaj kontraŭstari la sistemojn, kiujn ili estas trafintaj hazarde. Pene, dolore ili proksimiĝas al la kompreno, sed ĉu ili venkos? Kiu el ili kun obstino de heliko rampos plu por atingi la pinton? Kaj, cetere, kio estas tiu pinto? Vi vidos, ke la libro, ĉe atenta lego, kvazaŭ invitas la leganton trovi propran respondon al ĉiuj ĉi demandoj.

Mi plenumu mian devon per danko sincera al la grupo de adorantoj kaj esplorantoj de Strugackij-verkoj, konata sub la nomo «ludenoj», kaj inter ili persone al Svetlana Bondarenko, kiu provizis min per kanoneca teksto de la romano, kaj al Juriĵ Flejŝman, kiu donis utilajn konsilojn. Pro tre valoraj konsiloj mi danku ankaŭ esperantistojn: Angela Tellier (Felixstowe, Britio), Georgij Kokolija kaj Nikolao Gudskov (Moskvo, Rusio).

La tradukinto

¹ La protagonisto havas la saman nomon kiel la rolulo de «Kandid aŭ Optimismo» de Voltaire. *Candide* (fr.) – sincera, simplanima.

² Aludo al la vorto «domoroŝĉennij» (rus., ironia) – tro simpla, primitiva, rektasence – hejmedukita.

En dens' arbara, en la sin',
En fund' kaveta
L'estont' pli certe vaĉas min
Ol vorto veta.

Ĝi, ne logebla de l' diskut'
Aŭ flata vero,
Ovritas forste al profund'
Kaj al ekstero.

*B. Pasternak*¹

Pace rampu, helik',
Laŭ Fuĵi-monta dekliv'
Supren ĝis fora pint'!

*Issa, filo de kamparano*²

Ĉapitro unua

De sur tiu ĉi altaĵo la arbaro estis kvazaŭ pufa, makulita ŝaŭmo; kvazaŭ monde grandega poreca spongo; kvazaŭ besto, kiu sin kaŝis iam gvate, sed poste ekdormis kaj lasis krudmuskon sin kovri. Kvazaŭ senforma masko, kaŝanta vizaĝon, kiun ankoraŭ neniu kaj neniam estis vidinta.

Perek demetis sandalojn kaj sidiĝis, etendinte la nudajn kruojn abismen. Ŝajnis al li, ke la kalkanoj tuj iĝis humidaj, kvazaŭ li estus efektive merginta ilin en varman lilan nebulon, amasiĝintan en la ombro subroke. Li elpoŝigis kolektitajn ŝtonetojn kaj akurate dimetis ilin apude, poste prenis la plej etan kaj senimpete ĵetis ĝin sob, en la vivanton kaj silen-

¹ Boris Pasternak (1890–1960) – eminenta rusa verkisto, nobelpremiito.

² Issa Kobajaŝi (1763–1827) – japana poeto, majstro de hokku-triversoj.

tanton, en la dormanton, indiferentan glutanton por-
ĉiame, kaj la blanka sparko estingiĝis, kaj okazis ne-
nio – nek moviĝis ajnaj palpebroj, nek ajnaj okuloj
duonovriĝis por rigardi lin. Tiam li ĵetis duan ŝtone-
ton.

Se oni ĵetu po unu ŝtoneton ĉiun minuton kun
duono; kaj se vero estas tio, kion rakontis la unukru-
ra kuiristino kun moknomo Kazalunia kaj supozis
madam' Bardo', ĉefino de la Helpogrupo por loka lo-
ĝantaro; kaj se malvero estas tio, kion interflustris
ŝoforo Tuzik kun la Nekonato el la grupo de Inĝeni-
era penetro; kaj se ion valoras homa intuicio; kaj se
esperoj realiĝas almenaŭ foje en la vivo – tiuokaze
ĉe la sepa ŝtonĵeto la arbustoj transdorse kun krakado
disiĝos, kaj sur la kampeton, sur la herbon tretitan,
kvazaŭ grizharan pro matena roso, paŝos la direktoro,
nuda ĝisumbilike, en griza habardena¹ pantalone kun
lila pasamento, brue spiranta, grase rebrila, flavroz-
kolora, vila, kaj, rigardante nenion, nek la arbaron
sube, nek la ĉielon supre, ekklinos sin, mergante lar-
ĝajn manplatojn en la herbon kaj rektiĝante produk-
tos venton per eksvingoj de la vastaj manplatoj, kaj
ĉiufoje gravaspekta falto de lia ventro tajdos desupre
sur la pantalonon, kaj la aero, saturita per karboksi-
do kaj nikotino, fajfe kaj kluke eliĝos el la ovrita
buŝo. Samkiel submarŝipo, trablovanta cisternojn.
Samkiel sulfureska gejsero en Paramuŝir²...

La arbustoj transdorse disiĝis kun krakado. Perek
rigardis tien singardeme, sed estis tie ne la direktoro,
estis konata viro. Klaŭdio-Oktaviano Domaroŝĉiner el
la grupo de Ekstermo. Li alproksimiĝis malrapide kaj
haltis du paŝojn for, rigardante al Perek desupre
malen per penetremaj malhelaj okuloj. Li estis scian-
ta pri io, aŭ suspektanta pri io tre grava, kaj tiu scio

¹ Habardeno – speco de ŝtofo.

² Insulo en la norda parto de Kurila arkipelago.

aŭ suspekto senmovigis lian longan vizaĝon, la ŝtoni-
ĝintan vizaĝon de homo, kiu alportis ĉi tien, al la
krutaĵo, strangan, maltrankviligan novaĵon; neniu en
la mondo konis dume tiun novaĵon, sed klaris jam, ke
ĉio estas definitive aliiĝinta, ke ĉio iama ekde nun ne
plu gravas kaj ke, finfine, de ĉiu oni postulos ĉion,
pri kio tiu kapablas.

– Tamen, kies ŝuoj estas? – li demandis kaj
ĉirkaŭrigardis.

– Ne estas ŝuoj, – Perek diris. – Estas sandaloj.

– Ĉu vere? – Domaroŝĉiner ridetis kaj tiris el
poŝo grandan notlibron. – Ĉu sandaloj? Tr-re bone.
Sed kies sandaloj estas?

Li movis sin al la krutaĵo, singardeme rigardis
sob kaj tuj retiriĝis.

– Homo estas sidanta ĉe krutaĵo, – li diris, –
kaj apud li estas sandaloj. Neeviteble aperas deman-
do: kies sandaloj estas kaj kie estas la posedanto?

– La sandaloj estas miaj, – Perek diris.

– Ĉu viaj? – Domaroŝĉiner dubmiene rigardis
la grandan notlibron. – Sekve, vi sidas nudpiede, ĉu
ne? Kial? – Li impete kaŝis la grandan notlibron
kaj eligis el malantaŭa poŝo etan notlibron.

– Nudpiede – ĉar ne endas aliel, – Perek klari-
gis. – Mi estis hieraŭ perdinta tien mian dekstran ŝu-
on, do mi decidis, ke ekde nun mi ĉiam sidos nud-
piede. – Li klinis sin kaj rigardis trans la disgen-
uojn. – Jen ĝi kuŝas. Tuj mi ĝin per ŝtoneto...

– Momenton!

Domaroŝĉiner lerte kaptis lian manon kaj forpren-
nis la ŝtoneton.

– Efektive, estas simpla ŝtono, – li diris. –
Sed tio nenion ŝanĝas dume. Mi ne komprenas, Pe-
rec, kial do vi estas trompanta min. Ja ne eblas vidi
la ŝuon de tie ĉi – eĉ se ĝi efektive estas tie, sed ĉu
ĝi tieas, estas jam demando speciala, kiun ni traktu
iom poste, – do, se la ŝuo ne videblas, sekve vi ne

povas esperi trafi ĝin per ŝtono, eĉ se vi estus posedanta konforman traflertecon kaj vere deziranta tion kaj nur tion: mi parolas pri la trafo... Sed ni tuj esploru ĉion ĉi.

Li ŝovis la etan notlibron en surbrustan poŝon kaj refoje eligis la grandan notlibron. Poste li tiretis supren sian pantalonon kaj sidiĝis kaŭre.

– Do ankaŭ hieraŭ vi estis tie ĉi, – li diris. – Por kio? Kial vi jam la duan fojon venis al la krutaĵo, kien la ceteraj etatanoj de l' Administracio, ne dirante pri eksteretataj fakuloj, eĉ se venas, do nur por fari la naturan bezonon?

Perec streĉiĝis. Estas simpla profaneco, li pensis. Ne, tamen ne, tio estas ne atenco, nek malico, ne indas atenti tion. Estas simpla profaneco. Profanecon ne endas atenti, neniue atentis profanecon. Profaneco prifekas la arbaron. Profaneco ĉiam estas prifekanta ion, kaj, kutime, oni ne atentis tion. Profaneco neniam atentis profanecon...

– Verŝajne, vi ŝatas sidi ĉi tie, – Domaroŝĉiner daŭrigis konfidtone. – Verŝajne, vi tre ŝatas la arbaron. Ĉu vi ŝatas ĝin? Respondu!

– Sed vi? – Perec demandis.

Domaroŝĉiner snufis.

– Sed vi estu ĝentila, – li diris ofendite kaj malfermis la notlibron. – Vi scias perfekte, kie mi oficas, do mi oficas en la gupo de Ekstermo, kaj pro tio via demando, pli ĝuste, kontraŭdemando absolute ne havas sencon. Vi perfekte komprenas, ke mian rilaton al la arbaro difinas mia ofica devo, tamen, kio difinas vian rilaton al la arbaro – ne estas klara por mi. Tio ne bonas, Perec, vi nepre pensu pri tio, mi konsilas al vi nur por via utilo, ne por la mia. Ne endas esti tiom nekomprenebla. La persono sidas ĉe la krutaĵo, nudpieda, ĵetadas ŝtonojn... Por kio, mi demandu? Se mi estus vi, mi estus senkaŝe rakontinta ĉion al mi. Kaj metinta ĉion sur decan lokon. De kie

vi scias, eble ekzistas pravigaj argumentoj, kaj al vi nenio minacas finkalkule. Do Perec? Ja vi estas plenaĝa viro kaj vi devas kompreni, ke dusenca respondo ne akcepteblas. – Li fermis la notlibron kaj iom pensis. – Jen, ekzemple, ŝtono. Dum ĝi estas kuŝanta senmove, ĝi estas simpla, ĝi ne provokas dubojn. Sed jen ĝin prenas ies mano kaj ĵetas. Ĉu vi komprenas?

– Ne, – Perec diris. – Tamen, certe, jes.

– Do vidu. Simpleco tuj malaperas kaj ĝi ne plu estas. Kies mano? – ni demandas. Kien ĵetas? Aŭ, eble, al kiu? Aŭ, eble, kontraŭ kiu? Kaj por kio?.. Kaj kiel do vi kapablas sidi ĉerande de la krutaĵo? Ĉu vi estas naturdotita, aŭ vi speciale trejnitis vin? Jen, ekzemple, mi ne kapablas sidi ĉerande de la krutaĵo. Kaj estas timiga por mi la penso, ke iakaŭze mi ektrejnu min pri tio. Mi havas kapturon. Kaj tio estas natura. Homo entute ne havas ian kaŭzon por sidi ĉerande de la krutaĵo. Des pli se li ne havas paspermesilon por la arbaro. Bonvolu montri al mi vian paspermesilon, Perec.

– Mi ne havas la paspermesilon.

– Do. Vi ne havas. Sed kial?

– Mi ne scias... Oni ne donas, do...

– Ĝuste, oni ne donas. Ni konas tion. Sed ja kial oni ne donas? Oni donis al mi, oni donis al li, oni donis al ili kaj al multaj aliaj, sed al vi oni ial ne donas.

Perec singarde strabrigardis lin. Longa sengrasa nazo de Domaroŝĉiner estis snufanta, la okuloj ade palpebrumis.

– Verŝajne, ĉar mi estas deflanka persono, – Perec eligis supozon. – Verŝajne, pro tio.

– Tamen ja estas ne nur mi, kiu interesiĝas pri vi, – Domaroŝĉiner daŭrigis konfidvoĉe. – Se estus nur mi! Eĉ pli gravaj personoj interesiĝas pri vi... Aŭdu, Perec, ĉu vi povas sidiĝi flanken de la krutaĵo,

por ke ni havu eblecon daŭrigi? Mi havas vertiĝon, spektante vin.

Perec leviĝis.

– Estas pro tio, ke vi nervumas, – li diris. – Ni ne plu daŭrigu. Venis tempo por iri manĝejon, aliokaze ni malfruos.

Domaroŝĉiner rigardis horloĝon.

– Efektive, la tempo venis, – li diris. – Ial mi entuziasmiĝis hodiaŭ. Ĉiam vi, Perec, min iel... Mi eĉ ne scias kion mi diru.

Perec eksaltetis unupiede, surmetante sandalon.

– Ho, tamen iru for de la rando! – Domaroŝĉiner ekkriis suferulvoĉe, svingante per la notlibro kontraŭ Perec. – Vi iam min mortigos per viaj agaĉoj!

– Jam fino, – Perec diris, piedfrapetante. – Mi ne plu faros tion. Ĉu ni iru?

– Ni iru, – Domaroŝĉiner diris. – Sed mi konstatas, ke vi respondis eĉ ne unu mian demandon. Vi min tre ĉagrenas, Perec. Ne indas tio. – Li rigardis la grandan notlibron kaj, mirmovinte ŝultrojn, ŝovis ĝin subbraken. – Eĉ strangas tio. Entute mankas la impresoj, sen paroli pri la informoj. Totala neklareco.

– Tamen, kion mi respondu? – Perec diris. – Mi nur devus interparoli ĉi tie kun la direktoro.

Domaroŝĉiner haltis abrupte, kvazaŭ kaptita de arbustaro.

– Aĥ, do jen kiel vi tion aranĝas, – li diris jam alivoĉe.

– Kion ni aranĝas? Nenion ni aranĝas...

– Ne-ne, – Domaroŝĉiner diris flustre kaj ĉirkaŭrigardante. – Silentu kaj silentu. Neniaj vortoj bezonatas. Mi jam komprenis. Vi estis prava.

– Kion vi komprenis? Pri kio do mi pravas?

– Ne-ne, mi komprenis nenion. Ne komprenis – kaj punkto. Vi povas resti absolute trankvila. Do entute mi ne estis tie ĉi kaj mi ne vidis vin. Mi, se vi scivolas, dum la tuta mateno restis sidanta sur tiu ĉi

benketo. Tre multaj personoj povas atesti. Mi priparolos, mi petos...

Ili preterpasis la benketon, ascendis kaviĝintan ŝtuparon, direktis sin en la aleon kun ruĝsablaj vojoj, kaj tra l' pordegon eniris teritorion de la Administracio.

– Plena klareco povas ekzisti nur en certa nivelo, – Domaroŝĉiner parolis. – Kaj ĉiu devas scii, kion li povas pretendi. Mi pretendis klarecon en mia nivelo, estas mia rajto, kaj mi estas elĉerpinta ĝin. Sed tie, kie la rajtoj finiĝas, tie komenciĝas la devoj, kaj mi kuraĝu certigi vin, ke mi konas miajn devojn same bone kiel ankaŭ miajn rajtojn...

Ili iris preter dekapartamentaj vilaoj kun tule kurtenumitaj fenestroj, preterpasis garaĝon, tegitan per gofra feraĵo, paŝis trans sportejon, kie sur du fosto estis solece pendanta difektita volejbala reto, kaj ekpaŝis preter remizoj, apud kiuj la ŝarĝistoj estis trenantaj de sur karoserio grandegan ruĝan konteneron, preter hotelo, ĉe kies pordo staris kun teko morbe-pala komandanto kun senmovaj streĉitaj okuloj, preter longa baraĵo, malantaŭ kiu grincis motoroj. Ili iris pli kaj pli rapide, ĉar restis nemulte da tempo, kaj Domaroŝĉiner jam parolis nenion, nur anhelis kaj stertoris, poste ili ekkuris, kaj tamen, kiam ili kuratingis la manĝejon, estis jam malfrue, ĉiuj lokoj estis okupataj, nur apud deĵortableto en fora angulo restis du lokoj kaj la trian okupis ŝoforo Tuzik, kaj ŝoforo Tuzik, rimarkinta, ke ili staras senkuraĝe ĉe la eniro, svingis per forko, invitante al si.

Ĉiuj estis trinkantaj kefiron, ankaŭ Perec prenis kefiron por si, do sur ilia tablo, sur ĉifita tablotuko viciĝis ses boteloj, sed kiam Perec ekmovis la krurojn subtable, komfortigante sin sur la seĝo sensidloka, aŭdiĝis vitra ektinto, kaj intertablan spacon enruliĝis brandbotelo. Ŝoforo Tuzik lerte kaptis ĝin, ŝovis reen sub la tablon, kaj tie denove aŭdiĝis vitra ektinto.

- Pli akurate movu la krurojn, – li diris.
- Mi movis nevole, – Perc diris. – Ja mi ne sciis.
- Ĉu estas mi, kiu sciis? – oponis ŝoforo Tuzik. – Tie staras kvar boteloj, kaj poste mi devu pruvi, ke mi ne ’stas kriko.
- Se ni parolu pri mi, mi entute ne drinkas, – Domaroŝĉiner diris kun digno. – Sekve min tio absolute neniel koncernas.
- Ha, scias ni, kiel vi ne drinkas, – Tuzik diris. – Samtiel ankaŭ ni ne drinkas.
- Sed mi havas malsanan hepaton! – Domaroŝĉiner maltrankviliĝis. – Kial vi aŭdacas diri tion? Jen estas la atestpapero, mi petas...

Li eligis de ie kaj ŝovis subnazen al Perc ĉifitan kajerfolion kun triangula sigelspuro. Efektive ĝi estis atesto kun nedeĉifrebla medicinista skribaĵo. Perc deĉifris nur unu vorton: «antabus»¹, sed kiam, interesiĝinta, li provis preni la paperon, Domaroŝĉiner ne donis ĝin al li, sed ŝovis subnazen al ŝoforo Tuzik.

– Ĝi estas la lasta, – li diris. – Sed krome mi havas similajn por la pasinta jaro kaj ankaŭ por la antaŭpasinta, sed mi tenas ilin en sekurŝranko.

Ŝoforo Tuzik ne emis rigardi la ateston. Li elsuĉis plenan glason da kefiro, skuis la kapon, flaretis artikon de la montrofigro kaj, ekporetinte, diris feblavoĉe:

- Jen, ekzemple, kio krome troveblas en arbaro? La arboj. – Li viŝis la okulojn per maniko. – Sed eĉ tiuj ne restas sur siaj lokoj, ili saltas. Ĉu ci komprenis?
- Nu-nu? – Perc demandis avide. – Kiel do ili saltas?
- Do jen tiel. Staras ĝi senmove. Arbo, unuvorte. Subite ĝi ekkonvulsias, ekskuiĝas kaj – ek!

¹ Antabus (teturam) – medikamento por kuraci drinkulojn.

Bruo, krakado, sen diven’kompren’. Eble dek metrojn for ĝi saltis. Kajuton mian difektis. Kaj denove ĝi staras.

– Kial? – Perc demandis.

Li imagigis tion al si tre klare. Tamen ĝi, tute certe, estis nek konvulsianta, nek skuiĝanta, ĝi ektremis, kiam oni proksimiĝis al ĝi, kaj penis foriri. Eble ĝi sentis naŭzon. Sed eble timon.

– Kial ĝi saltas? – li demandis.

– Ĉar ĝin oni nomas: la arbo saltanta, – Tuzik klarigis, verŝante por si kefiron.

– Hieraŭ alvenis stoko da novaj elektrosegiloj, – Domaroŝĉiner komunikis, lekante la lipojn. Fenomene produktivaj. Mi eĉ diru, ke ili estas ne segiloj, sed segmaŝinoj. Niaj segmaŝinoj por ekstermado.

Ĉiuj ĉirkaŭe trinkis kefiron – el facetitaj glasoj, el ladtasoj, el kaftasetoj, el papervolvaĵoj, senpere el boteloj. Ĉies piedoj estis ŝovitaj sub seĝojn. Kaj, verŝajne, ĉiuj povintus tuj montri atestajn paperojn pri malsanoj de hepato, stomako, duodeno. Por la kuranta jaro, ankaŭ por la pasintaj.

– Sed poste min invitis la manaĝero, – Tuzik daŭrigis laŭtiginte la voĉon, – kaj demandis, kial la kajuto estas difektita. Ĉu denove, li diras, ci, kanajlo, kaŝlaboris flanke? Jen vi, pan’¹ Perc, ludas ŝakojn kun li, do eble vi bonvolu diri al li vorteton mindefende, li vin estimas, ofte parolas pri vi... Perc, li diras, jen estas fuguro! Mi, li diras, por Perc ne donos aŭton, eĉ ne petu. Malendas forlasi tian personon. Komprenu do, li diras, stultuloj, ja ni sopiros sen li! Do volu diri vorteton, ha?

– B-bone, – Perc diris per voĉo febliĝinta. – Mi provos. Tamen kiel do li... la aŭton?

– Estas mi, kiu povas paroli kun la manaĝero, – Domaroŝĉiner diris. – Ni militservis kune, mi estis

¹ Pan’ (pol.) – sinjoro.

kapitano, kaj li estis mia leŭtenanto. Li ĝis nun salutas min, per levo de la mano al la kapvesto.

– Krome, estas tie ankaŭ lagvirinetoj, – Tuzik diris, tenante antaŭ si glason da kefiro. – En grandaj puraj lagoj. Ili kuŝas tie, vidu! Nudaj.

– Estis vizio al vi, Tuz, pro via kefiro, – Domaroŝĉiner diris.

– Sed mi mem ja ne vidis ilin, – oponis Tuzik, movante la glason al la buŝo. – Sed la akvon el tiuj lagoj oni ne trinku.

– Vi ne vidis ilin, ĉar ili ne ekzistas, – Domaroŝĉiner diris. – Lagvirinetoj estas mistikaĵo.

– Mem ci estas mistikaĵo, – Tuzik diris, viŝante la okulojn per maniko.

– Momenton, – Perek diris. – Momenton. Tuzik, vi diras, ke ili estas kuŝantaj... Sed kion plu? Ne povas esti, ke ili simple kuŝu, kaj fino.

...Eble, ili loĝas subakve kaj leviĝas al la surfaco, samkiel ni, homoj, eliras sur balkonon el fumodoraj ĉambroj dum luna nokto kaj, ferminte la okulojn, donas la vizaĝojn al la malvarmeto, do tiuokaze ili povas esti simple kuŝantaj. Simple kuŝantaj – kaj fino. Ripozantaj. Kaj pigre interparolantaj kaj ridetantaj unu al la alia...

– Ci kun mi ne disputu, – Tuzik diris, streĉrigardante Domaroŝĉiner-on. – Ĉu ci do iam estis en la arbaro? Ja ci eĉ ne unu fojon estis en la arbaro, sed ja disputemas.

– Stultaĵ' do, – Domaroŝĉiner diris. – Kion mi faru en via arbaro? Paspermesilon mi havas en vian arbaron. Sed vi, Tuz, nenian paspermesilon havas. Bonvolu do montri al mi vian paspermesilon, Tuz.

– Mi mem tiujn lagvirinetojn ne vidis, – Tuzik ripetis, parolante al Perek. – Sed mi pri ili kredas absolute. Ĉar buboj rakontas. Kaj eĉ Kandid rakontis do. Sed ja Kandid ĉion sciis pri la arbaro. Li en tiun arbaron samkiel al sia virino iradis, ĉion konis tie eĉ palpe. Ankaŭ pereis li tie, en sia arbaro.

– Se li vere estus pereinta, – Domaroŝĉiner diris altsignife.

– Kial do «se li vere»? Forflugis la viro per helikoptero, kaj dum tri jaroj nek diro nek suspiro pri li. En la ĵurnalo funebra informo estis, funebraĵoj okazis, kion pli ci bezonas? Frakasiĝis Kandid, certe.

– Ni scias tro malmulte, – Domaroŝĉiner diris, – por aserti ion tute definitive.

Tuzik kraĉis kaj iris al vendotablo por preni plian botelon da kefiro. Tiumomente Domaroŝĉiner klinis sin al la orelo de Perek kaj, kun tim' en la okuloj, elflustris:

– Konsideru, ke rilate Kandid-on ni havis sekre-tan ordonon... Mi opinias min rajta informi vin, ĉar vi estas persono flanka...

– Kia ordono?

– Konsideri lin viva, – Domaroŝĉiner fundvoĉe elflustris kaj movis sin for. – Bona, freŝa kefiro estas hodiaŭ, – li elparolis laŭte.

Bruo ekis en la manĝejo. Tiuj, kiuj jam finmanĝis, ekstaradis, movante seĝojn, kaj direktadis sin al la eliro, laŭte parolante, ekfumadis kaj ĵetadis alume-tojn surplanken. Domaroŝĉiner malice ĉirkaŭrigardadis kaj al ĉiu preteriranto diradis: «Iel strangas tio, sinjoroj, vi ja vidas, ke ni konversacias...»

Kiam Tuzik revenis kun botelo, Perek diris al li:

– Ĉu vere la manaĝero serioze diris, ke li ne donos aŭton por mi? Eble li nur ŝercis?

– Kial do ŝercis? Ja li vin, pan' Perek, tre ŝatas, li sopiras sen vi, kaj forlasi vin de ĉi tie estus do malprofita ago por li... Do forlasu li vin, sed kion li gajnos per tio? Ne estas ŝercoj.

Perek mordetis la lapon.

– Sed kiel mi forveturu? Mi ne plu havas ion por fari tie ĉi. Ankaŭ la viztempo finiĝas. Kaj krome mi simple volas jam forveturi.

– Ĝenerale, – Tuzik diris, – se vi ricevos tri strogaĉojn¹, oni vin forĵetos de tie ĉi momente. Oni por vi specialan buson donos, ŝoforon vekos eĉ nokte, vi eĉ ne havos tempon por la posedaĵon kunmeti... Kion do niaj buboj faras? Unua strogaĉo – kaj oni malaltigas postenon de la kulpanto. La dua strogaĉo – oni sendas lin en la arbaron por ke li pentu tie. Sed la tria strogaĉo – adiaŭ kun saluto. Se, mi diru, mi ekvolos esti maldungita, do eltrinkos mi botelaĉon kaj draŝos la muzelon de tiu ĉi ulo. – Li montris Domaroŝĉiner-on. – Tuj oni senigos min je premia mono kaj sendos ŝofori merdoportilon. Tiam kion mi faru? Mi trinku plian botelaĉon kaj draŝu lian muzelon ankoraŭfoje, ĉu kompreneblas? Ĉi-kaze oni forigos min de la merdoportilo kaj sendos al la biostacio por ke mi tie kaptadu ĉiajn-tiajn mikrobojn. Sed mi ne iru biostacion, mi trinku plian botelaĉon kaj draŝu lian muzelon la trian fojon. Jen do tiam venos la fino. Mi estos maldungita pro la huliganaj agoj kaj forigita de ĉi tie dum dudek kvar horoj.

Domaroŝĉiner perfingre minacis al Tuzik.

– Misinformas, misinformas vi, Tuz. Unue, inter la agoj devas pasi ne malpli ol monato, aliokaze ĉiuj agoj estos traktataj kiel unu, kaj la fiaganton oni simple enkarcerigos sen movi lian kazon ene de la Administracio. Due, post la dua delikto oni forsendos la kulpanton en la arbaron senprokraste en akompano de gardisto, do la kulpanto malhavas la eblecon fari la trian delikton laŭ sia bontrovo. Vi ne atentu lin, Perek, li ne kompetentas pri similaj problemoj.

Tuzik sorbetis kefiron, sulkigis la vizaĝon kaj graketis.

– Estas vero, – li konfesis. Ĉi-okaze mi, eble, efektive... misetis. Pardonu do, pan' Perek.

¹ Strogaĉo – puna mallaŭdo per skriba ordono de l' ĉefo.

– Tamen ne gravas... – Perek diris triste. – Tutegale mi ne povas senkaŭze bati vizaĝon de iu.

– Do ne nepras tion... muzelon. – Tuzik diris. – Vi povas, ekzemple, ankaŭ tion... postaĵon. Aŭ simple kostumon lian ŝiri.

– Ne, tion mi ne scipovas, – Perek diris.

– Tiukaze la afero mavas, – Tuzik diris. – Tiukaze plago estas por vi, pan' Perek. Tiukaze ni faru jen kion. Morgaŭ venu ĉirkaŭ la sepa en la garaĝon, sidiĝu en mian aŭton kaj atendu. Mi veturigos vin.

– Ĉu vere? – Perek ekĝojis.

– Do. Mi devas morgaŭ la Kontinenton veturi, feraĵojn forporti. Do ni veturu kune.

En angulo subite iu horore ekkriis: «Kion ci faris? Ci supon mian elverŝis!»

– Homo devas esti simpla kaj klara, – Domaroŝĉiner diris. – Ne komprenas mi, Perek, kial do vi volas de tie ĉi forveturi. Neniu volas forveturi, sed vi volas.

– Ĉiam al mi tio okazas, – Perek diris. – Mi ĉiam faras ĉion inverse. Kaj krome, kial do nepre homo devas esti simpla kaj klara?

– Homo devas esti sobra, – Tuzik deklaris, flarante artikon de la montrofigro. – Ĉu ci diru, ke ne?

– Mi ne drinkas, – Domaroŝĉiner diris. – Kaj mi ne drinkas pro la kaŭzo tre simpla kaj klara por ĉiu: mi havas malsanan hepaton. Do vi, Tuz, min ne kaptos.

– Kio min mirigas en la arbaro, – Tuzik diris, – tio estas la marĉoj. Ili estas varmegaj, ĉu kompreneblas? Mi ne toleras tion. Neniel mi povas kutimiĝi. Jen – falu mi hazarde, forglitu de sur la digo, kaj do sidos mi en la kajuto sen eblo eliĝi. Kvazaŭ legomsupo varmega. Vaporo leviĝas, ankaŭ supodoro, mi eĉ provis manĝeti, tamen malbongustas, kvazaŭ ne sufiĉe salita estas la supo, aŭ io simila... Ne-e, la arbaro – ĝi estas ne por homo. Kion do ili ne vidis tie? Kaj pelas kaj peladas maŝinaron, kvazaŭ en gla-

citruon; ĝi dronas tie, sed ili mendas pli, ĝi dronas, sed ili pli...

...Verda fortodora abundo. Abundo de koloroj, abundo de odoroj. Abundo de vivo. Sed ĉio ĉi estas fremda. Iel konata, pro io simila, sed enreale fremda. Verŝajne plej malfacilas paciĝo kun la fakto, ke ĝi estas kaj fremda kaj konata samtempe. Kun la fakto, ke ĝi estas derivaĵo de nia mondo, karno de nia karno, tamen foririnta de ni kaj ne deziranta kontakti nin. Verŝajne same povus pensi pitekantropo pri ni, pri siaj posteuloj, – kun amaro kaj kun timo...

– Kiam aperos la ordono, – Domaroŝĉiner proklamis, – ni estas movontaj tien ne viajn fiajn buldozojn kaj ĉienirajn aŭtojn, sed certajn efikajn teknikaĵojn, kaj dum du monatoj ni transformos ĉion tie en... e-e... en betonitan placon, sekan kaj platan.

– Ci transformos, – Tuzik diris. – Se muzelon cian oni ne draŝu ĝustatempe, ci propran patron transformos en betonitan placon. Por klareco.

Eksonis densa sirenoĉo. Vitroj ekvibris en fenestroj, kaj samtempe super la pordo ektintegis potenca sonoro, ekglimis lumoj sur la muroj, kaj super la vendotablo ekbrilis grandampleksa skribaĵo: «LEVIĜU, ELIRU!» Domaroŝĉiner haste leviĝis, ĝustigis nadlon de brakhorloĝo kaj, sen diri eĉ vorton, ekkuregis.

– Do mi iru, – Perc diris. – Estas tempo por labori.

– Estas tempo, – Tuzik konsentis. – Ĝuste la tempo.

Li demetis vatjakon, akurate volvis ĝin kaj, kunmovinte seĝojn, ekkuŝis, metinte la vatjakon kusene.

– Do ĉu morgaŭ je la sepa? – Perc diris.

– Kion? – Tuzik demandis dormemvoĉe.

– Morgaŭ je la sepa mi venos.

– Kien do? – Tuzik demandis, ruliĝante sur la seĝoj. – Dismoviĝas ili, kanajloj, – li elbalbutis. – Kiomfoje mi jam diris: alportu divanon ĉi tien...

– En la garaĝon, – Perc diris. – Al via aŭto.

– Aha-a... Do venu, venu, tie ni vidos. Malfacilas ĉi afero.

Li kunpremis la krurojn, ŝovis la manplatojn subbraken kaj eksnufis. Brakoj liaj estis harkovritaj, kaj sub la hararo videblis tatuaĵo. Tio estis skribaĵoj: «kio nin pereigas» kaj «nur antaŭen». Perc direktis sin al la eliro.

Laŭ breteto li transpaŝis grandegan flakon en la malantaŭa korto, ĉirkaŭiris holmeton da malplenaj konservaĵskatoloj, rampis tra fendon en latbarilo kaj eniris konstruaĵon de la Administracio, uzinte ofican enirpordon. En la koridoroj estis malvarmo kaj malumo, longtempa odor' de tabako, polvo kaj neuzataj paperoj. Neniu videblis ĉie ajn, nenio aŭdeblis trans ledimite tapetitaj pordoj. Laŭ mallarĝa ŝtupareto sen balustrado, apogante sin kontraŭ aĉa muro, Perc ascendis la duan etaĝon kaj proksimiĝis al la pordo, super kiu jen eklumis, jen estingiĝis la skribaĵo: «LAVU LA MANOJN ANTAŬ LABOR'». Sur la pordo elstaris granda nigra necesejsigno «M». Perc puŝis la pordon kaj eksentis certan konsterniĝon, trovinte, ke li trafis propran kabineton. Do, certe, ĝi estis ne lia kabineto, ĝi estis kabineto de Kim, la estro de la grupo de Scienca protekto, sed en tiu ĉi kabineto oni instalas tablon por Perc, kaj nuntempe tiu ĉi tablo estis staranta flanke de la pordo, kaj duontablon laŭkutime okupis tolkovrita «mercedes»¹, kaj ĉe granda, lavita fenestro staris la tablo de Kim, kaj mem Kim jam estis laboranta: li sidis kurbiĝinte kaj spektis logaritman liniilon.

– Mi nur manojn volis lavi... – Perc diris konsternite.

– Lavu, lavu, – Kim diris, svinginte la kapon. – Jen por vi lavabo. Nun ni fartos tre komforte. Nun ĉiuj irados al ni.

¹ Speco de kalkulmaŝino de samnoma germana firmao.

Perec iris al lavabo kaj komencis lavi la manojn. Li lavis la manojn per varma kaj malvarma akvo, per du specoj de sapo kaj per speciala grasforiganta pasto, frotis ilin per spongo kaj per kelkaj brosetoj diversgrade duraj. Poste li ŝaltis elektrosekigilon kaj kelkminute tenis la rozklorajn malsekajn manojn en muĝanta fluo de varma aero.

– Je la kvara matene oni anoncis al ĉiuj, ke ni estas translokigitaj al la dua etaĝo, – Kim diris. – Sed vi kie estis? Ĉu al Alevtina iris?

– Ne, mi estis sur la krutaĵo, – Perec diris, ek-sidante ĉe sia tablo.

La pordo ovriĝis, la ejon impete eniris Prokonsulo, svingis salute per teko kaj malaperis trans kuliso. Estis aŭdeble, kiel knaretis la pordo de necesejo kaj klakis riglilo. Perec demetis kovrilon de «mercedes», iom sidis senmove, poste aliris la fenestron kaj ovris ĝin.

La arbaro ne estis videbla de tie ĉi, sed la arbaro ĉeestis. Ĝi ĉeestis ĉiam, kvankam oni povus vidi ĝin nur de sur la krutaĵo. En ĉiu ajn alia loko de la Administracio ĝi ĉiam estis per io ŝirmata. Ĝin ŝirmis kremkoloraj konstruaĵoj de mekanikriparejoj kaj kvaretaĝa garaĝo por personaj aŭtoj de la oficistaro. Ĝin ŝirmis brutejoj de provizmastrumo kaj tolaĵoj, pendigitaj apud la lavejo, kie sekiga centrifugilo konstante paneis. Ĝin ŝirmis la parko kun florbedoj kaj pavilonoj, kun «diabla rado» kaj gipsaj naĝantinoj, kies korpojn ornamis perkrajonaj skribaĵoj. Ĝin ŝirmis vilaoj kun verandoj, hedervolvitaj, kun krucoj de televidantenoj. Sed de tie ĉi, el la fenestro de la dua etaĝo, la arbaro ne estis videbla pro alta brika baraĵo, ne ankoraŭ finkonstruita, sed jam tre alta, kiun oni estis konstruantaj ĉirkaŭ la plata unuetaĝa domo de la grupo de Inĝeniera penetro. La arbaron oni povis vidi nur de sur la krutaĵo, sed prifeki la arbaron oni povis same nur de sur la krutaĵo.

Tamen eĉ la persono, kiu vidis la arbaron neniam dum la vivo, kiu nenion aŭdis pri la arbaro, ne pensis pri ĝi, ne timis la arbaron kaj ne revis pri la arbaro, eĉ tia persono povus facile konjekti ties ekziston jam nur pro tio, ke estis ekzistanta la Administracio. Jen do mi tre delonge pensis pri la arbaro, diskutis pri la arbaro, vidis ĝin en miaj sonĝoj, sed eĉ ne suspektis, ke ĝi ekzistas en realo. Kaj mi certiĝis pri ĝia ekzisto ne tiam, kiam mi estis la unuan fojon elirinta sur la krutaĵon, sed kiam mi legis la skribaĵon sur la ŝildo apud la enirpordo: «ADMINISTRACIO PRI LA AFEROJ DE LA ARBARO». Antaŭ tiu ŝildo mi staris kun valizo enmane, polvokovrita kaj sekiĝinta post longa vojo, mi estis leganta kaj releganta ĝin kaj mi sentis febliĝon en la genuoj, ĉar mi sciis ekde nun, ke la arbaro ekzistas, sekve ĉio, kion mi pensis pri ĝi antaŭ nun, estas ludo de malforta imago, pala, senpova mensogaĵo. La arbaro ekzistas, kaj tiu ĉi grandega mornaspekta konstruaĵo okupiĝas pri ĝia sorto...

– Kim, – Perec diris, – ĉu mi eĉ ne sukcesos trafi la arbaron? Ja mi estas forveturonta morgaŭ.

– Sed ĉu vi vere volas trafi tien? – Kim demandis distrite.

...Verdaj varmegaj marĉoj, nervozaj timemaj arboj, lagvirinetoj, ripozantaj sur akvo sub la luno post sia mistera agado en profundo, singardemaj nekompreneblaj aborigenoj, senhomaj vilaĝoj...

– Mi ne scias, – Perec diris.

– Vi ne rajtas iri tien, Perĉjo, – Kim diris. – Tien rajtas iri nur la homoj, kiuj neniam estis pensintaj pri la arbaro. Kiuj ĉiam indiferentis al la arbaro. Sed vi tro profunde prenas ĝin en la koron. La arbaro por vi estas danĝera, ĉar ĝi vin trompos.

– Verŝajne, – Perec diris. – Sed mi ja venis tien ĉi nur por ekvidi ĝin.

– Por kio vi bezonas amarajn veraĵojn? – Kim diris. – Kion vi faros kun tiuj? Kaj kion vi intencas

fari en la arbaro? Ĉu plori pri la revo, kiu transformiĝis en la sorton? Ĉu preĝi, ke ĉio estu ne tia? Aŭ, dio savu, vi decidis refari tion, kio estas, al tio, kio devas esti?

– Sed por kio mi tien ĉi venis?

– Por konvinkiĝi. Ĉu vi vere ne komprenas, kiom gravas tio: konvinkiĝi. La aliaj venas por alio. Por trovi en la arbaro kubmetrojn da lignaĵo. Aŭ por trovi bakterion de l'vivo. Aŭ por verki disertacion. Aŭ por ricevi paspermesilon, ja ne por iradi la arbaron, sed simple por ajnokazo: iam ĝi utilos, des pli ne ĉiuj ĝin havas. Sed la kulmino de ĉiuj streboj – estas elprodukti el la arbaro pompan parkon, same kiel skulptisto produktas statuon el marmora ŝtonego. Por poste tiun parkon tondadi. De jaro al jaro. Ne permesi al ĝi denove iĝi arbaro.

– Foriri mi volas de tie ĉi, – Perek diris. – Mankas io por fari tie ĉi. Iu devas foriri, aŭ mi, aŭ ĉiuj vi.

– Ni multipliku, – Kim diris, kaj Perek sidiĝis ĉe sia tablo, trovis haste faritan konektilon kaj ŝaltis «mercedes»-on.

– Sepcent naŭdek tri kvincent dudek du je ducent sesdek ses nul dek unu...

«Mercedes» ekfrapis kaj ekskuiĝis. Perek iom atendis por ke ĝi trankviliĝu, kaj stumble tralegis la respondon.

– Bone. Nuligu, – Kim diris. – Nun sescent naŭdek ok tricent dek du dividu por mi per dek dek kvin...

Kim estis diktanta ciferojn, kaj Perek kunmetadis ilin, premadis klavojn por multipliko kaj divido, adiciis, subtrahis, radikis, kaj ĉio daŭris laŭkutime.

– Dek du je dek, – Kim diris. – Multipliku.

– Unu nul nul sep, – Perek diktis aŭtomate, sed poste rekonsciiĝis kaj diris: – Aŭdu, ja ĝi mensogas. Devas esti cent dudek.

– Scias mi, scias, – senpacience diris Kim. – Unu nul nul sep, – li ripetis. – Do nun radiku por mi dek nul sep...

– Tuj, – Perek diris.

Denove klakis riglilo transkulise, kaj aperis Prokonsulo, rozkolora, freŝa kaj kontentiĝinta. Li komencis lavi la manojn, kantetante ĉe tio per agrabla voĉo «Ave Maria». Poste li proklamis:

– Tamen ja kia miraklo estas tiu arbaro, sinjoroj miaj! Kaj kiom malmulte, krime malmulte ni parolas kaj skribas pri ĝi! Kaj tamen ĝi meritas, ke oni skribu pri ĝi. Ĝi estas nobliganta, vekanta altajn sentojn. Ĝi asistas progreson. Ĝi mem similas simbolon de progreso. Sed ni neniel kapablas ĉesigi vastiĝon de profanaj onidiroj, fabletoj, anekdotoj. Propagando de la arbaro, laŭesence, ne estas farata. Diablo scias, kion oni diradas kaj pensadas pri la arbaro...

– Sepcent okdek kvin multipliku je kvarcent tridek du, – Kim diris.

Prokonsulo laŭtigis la voĉon. La voĉon li havis fortan kaj bone agorditan – «mercedes» ne plu estis aŭdebla.

– «Ni vivas, kiel en arbaro»... «Arbaraj homoj»... «Pro multo da arboj ili arbaron ne vidas»... «Tiu arbaren, sed tiu por lignaĵo»... Jen kontraŭ kio ni devas batali! Jen kion ni devas elradikigi. Ekzemple vi, mosje Perek, kial vi ne batalas? Ja vi povintus fari en la klubejo detalan, celhavan prelegon pri la arbaro, sed vi ne faras ĝin. Mi delonge vin observas kaj atendadas, sed tute vane. Kial do?

– Sed mi ja neniam estis tie, – Perek diris.

– Ne gravas. Ankaŭ mi tie neniam estis, sed mi estis farinta prelegon, kaj, juĝante laŭ la reeĥoj, la prelego estis tre utila. Ja ne gravas, ĉu estis vi en la arbaro aŭ ne estis, gravas, ke oni forigu de sur la faktoj ŝelon de mistiko kaj superstiĉoj, nudigu la substancon, forŝirinte ties vestaĵon, fuŝmetitan de filistroj kaj utilistoj...

– Duoble ok per kvardek naŭ minus sepoble sep, – Kim diris.

«Mercedes» ekfunkciis. La Prokonsulo pli laŭtigis la voĉon.

– Mi estis faranta tion ĉi kiel filozofa laŭklere, sed vi povas fari tion kiel lingvisto laŭklere. Mi al vi donos la tezojn, kaj vi disvolvigu tiujn, konsiderante lastajn atingojn de la lingvoscienco... Aŭ kio do estas temo de via disertacio?

– Mia temo estas «La specifajoj de stilo kaj ritmo de la virina prozo en la lastaj verkoj de Heĵan»¹ surbaze de la materialoj de «Makura-no sosi»², – Perek diris. – Mi dubas, ke...

– Per-fe-kte! Estas ĝuste tio, kion ni bezonas. Kaj emfazu, ke ne estas marĉoj kaj dronejoj, sed brilaj kuraĉlokoj; ne saltantaj arboj, sed produktaĵoj de altevoluinta scienco; ne aborigenoj, ne sovaĝuloj, sed antikva civilizo de la homoj fieraj, liberaj, altpensaj, modestaj kaj potenohavaj. Kaj estu neniam lagvirinetoj! Nenia lila nebulo, neniam nebulaj aludoj – pardonu min por la misa kalemburo... Estos bonege, minher Perek, estos ekscelence! Kaj tre bonas, ke vi konas la arbaron, vi rajtas komuniki viajn personajn impresojn. Ankaŭ mia prelego estis bona, sed, mi timas, ke iom abstrakta. Kiel bazan materialon mi eluzis protokolojn de la kunsidoj. Sed vi, kiel esploranto de la arbaro...

– Mi ne estas esploranto de la arbaro, – Perek diris konvinke. – Oni ne lasas min en la arbaron. Mi ne konas la arbaron.

¹ Heĵan – periodo en la historio de Japanio (794 – 1185), nomata laŭ la nomo de tiama ĉefurbo (nuntempa Kioto).

² «Makura-no sosi» («Notoj ĉe la kapapogilo») – la unua japana eseo taglibroforma de la verkistino Sei Senagon (ĉ. 966 – ?).

La Prokonsulo distrite kapjesis, rapide skribante ion sur la maniko.

– Jes, – li parolis. – Ja jes. Bedaŭrinde tio estas amara vero. Bedaŭrinde tion oni dume povas renkonti ĉi tie – formalecon, burokratecon, heŭristikan rilaton al la personeco... Ankaŭ pri tio vi, interalie, povas diri. Povas, povas, ĉiuj parolas pri tio. Kaj mi penas interkonsenti pri via prelego kun la direkto. Mi treege ĝojas, Perek, ke vi finfine partoprenos nian laboron. Mi estas jam delonge kaj tre atente observanta vin... Jen do, mi enskribis vin por la sekvanta semajno.

Perek malŝaltis «mercedeson».

– Mi forestos en la sekva semajno. Finiĝis mia vizo, kaj mi estas forveturonta. Morgaŭ.

– Do tion ni iamaniere ordigos. Mi iros al la direktoro, li mem estas membro de la klubo, li komprenos. Konsideru, ke vi restas por plia semajno.

– Ne endas, – Perek diris. – Ne endas!

– Endas! – Prokonsulo diris, rigardante liajn okulojn. – Vi perfekte scias, Perek: endas! Ĝis revido.

Li salutlevis du fingrojn al la tempio kaj foriris, svingante paperujon.

– Ia araneaĵo, – Perek diris. – Ĉu ili opinias min muŝo? La manaĝero ne volas, ke mi forveturu, Alevtina ne volas, kaj nun ankaŭ tiu...

– Ankaŭ mi ne volas, ke vi forveturu, – Kim diris.

– Sed mi ne povas resti plu tie ĉi!

– Sepcent okdek sep multipliku je kvar cent tridek du...

Tutegale mi forveturos, – Perek pensis, – premante la klavojn. Tutegale mi forveturos. Vi ne volu, sed mi forveturos. Ne ludos mi kun vi tablotenison, ne ludos ŝakojn, nek dormos, nek trinkos teon kun konfitaĵo, ne plu mi volas kanti por vi kantojn, kalkuli por vi per «mercedes», prijuĝi viajn dispu-

tojn, des pli nun ankaŭ fari por vi prelegojn, kiujn vi tutegale ne komprenos. Ankaŭ pensi anstataŭ vi mi ne emas, pensu memstare, sed mi forveturos. Forveturos. Forveturos. Tutegale vi neniam komprenos, ke pensado estas ne distro sed devo...

Ekstere, trans la muro nefinkonstruita, peze frapegis ramo, mitralis pneŭmatikaj marteloj, brue faladis brikoj, sed sur la muro unu post alia sidis kvar laboristoj, nudaj ĝislumbe, en kasketoj, kaj fumis. Poste ĝuste sub la fenestro ekmuĝis kaj ekkrakis motorciklo.

– Iu el la arbaro venis, – Kim diris. – Rapide multipliku por mi dek ses je dek ses.

Iu abrupte ovrís la pordon, kaj en la ĉambron enkuris viro. Li estis en kombineo, malbutonumita kapuĉo pendis surbruste sur ŝnureto de sendoricevilo. De la ŝuoj ĝis la rimeno lian kombineon hirte kovris palrozaj saĝetoj de junaj sprosoj, kaj la dekstran kru-ron volvis oranĝbenda liano senfine longa, sternita laŭplanke. La liano estis ankoraŭ tremetanta, kaj ŝajnis al Perek, ke ĝi estas vera tentaklo de la arbaro mem, ke ĝi tuj streĉiĝos kaj trenos la viron reen – tra koridorojn de la Administracio, sob laŭ ŝtuparo, laŭ la korto preter la muro, preter la manĝejo kaj la riparejoj kaj plu malsupren, laŭ polvkovrita strato, tra l' parkon, preter statuoj kaj pavilonoj, al la komenco de la serpentvojo, al la pordego, tamen ne en la pordegon, sed preter ĝi, al la krutaĵo, malsupren...

Li havis motrciklistajn okulvitrojn, lian vizaĝon dense kovris polvo, kaj Perek ne tuj divenis, ke la viro estas Stojan Stojanov de la biostacio. Enmane li havis grandan papervolvaĵon. Li faris kelkajn paŝojn laŭ la kahelita planko, laŭ la mozaiko, prezentanta virinon sub duŝo, kaj haltis antaŭ Kim, kaŝinte la papervolvaĵon transdorsen kaj farante strangajn movojn per la kapo, kvazaŭ lia kolo estis jukanta.

– Kim, – li diris. – Estas mi.

Kim ne respondis. Aŭdeblis nur, kiel lia skribilo skrapas kaj ŝiras paperon.

– Kimĉjo, – Stojan diris flateme. – Mi petegas vin.

– Iru for. – Kim diris. – Maniulo.

– La lastan fojeton, – Stojan diris. – La plej-plej lastan.

Li refoje faris la kapmovon, kaj Perek ekvidis sur lia sengrasa razita kolo, ĝuste en la kaveto sub la nuko, mallongan rozkoloran sproson, mincan, akran, jam spiraliĝantan, tremantan, kvazaŭ pro avido.

– Vi nur transdonu kaj diru, ke tio estas de Stojan, kaj nenion pli. Se ŝi vin en kinejon vokos, mensogu, ke vi havas urĝan vesperan laboron. Se proponos teon, diru ke vi ĵus trinkis. Ankaŭ vinon rifuzu, se ŝi proponos. Ha? Kimĉjo! La plej-plej lastan fojeton!

– Kial ci skuas la kolon? – Kim demandis kun kolero. – Turnu vin do!

– Ĉu denove mi infektiĝis? – Stojan demandis, sin turnante. – Nu, tio ne gravas. Vi nur transdonu, ĉio cetera ne gravas.

Kim, sin klininte trans la tablon, estis ion faranta al lia kolo, ion premadis kaj masaĝis, disiginte la kubutojn, kun abomenrikano murmurante sakraĵojn. Stojan pacience paŝetadis de unu piedo al alia, klininte la kapon kaj kurbiginte la kolon.

– Saluton, Perĉjo, – li parolis. – Delonge mi vin ne vidis. Kiel do vi? Sed mi jen denove alportis, kion do fari... La plejpleje lastan fojon. – Li malvolvis la paperon kaj montris al Perek bukedeton da venenverdaj arbaraj floroj. – Sed kiel ili odoras! Odoregas!

– Tamen ne skuiĝu, ci! – Kim kriis ordone. – Staru trankvile! Maniulo, ŝtipkapulo!

– Maniulo, – konsentis Stojan entuziasme. – Ŝtipkapulo. Sed! La plejpleje lastan fojon!

La rozkoloraj sprosoj sur lia kombineo estis jam ekvelkantaj, ŝrumpantaj kaj faladis planken, sur la kahelan vizaĝon de la virino sub duŝo.

– Fino. – Kim diris. – Iru for.

Li flankeniris de Stojan kaj ĵetis en rubujon ion duonvivan, konvulsiantan, sangantan.

– Mi jam foriras, – Stojan diris. – Senprokraste mi foriras. Ĉar, imagu, nia Rita denove ekstravagancas, nun mi eĉ timas foriri de la biostacio. Perĉjo, venu al ni, mi petas, parolu al ili, ha...

– Jen kapricol! – Kim diris. – Ne estas por Perek io fareda tie.

– Kial do ne estas? – eksklamaciis Stojan. – Kventin ja magriĝias de tag' al tago! Vi nur aŭdu: antaŭ semajno Rita estis fuĝinta – tamen, kion ni faru do... Sed ĉi-nokte ŝi revenis tute malseka, blanka, glacia. La gardisto provis teni ŝin nudmane – ion tian ŝi estis farinta al li – ĝis nun li kuŝaĉas svene. Ankaŭ la tuta eksperimenta parcelo kovriĝis per herboj.

– Do? – Kim diris.

– Kaj Kventin ploris dum tuta mateno...

– Ĉion ĉi mi konas, – Kim intervenis. – Mi ne komprenas, kian rilaton Perek havas al tio.

– Do kial, kian rilaton? Nu kion vi diras? Kiu krome, se ne Perek? Ja ne mi, ĉu vere? Kaj ankaŭ ne vi... Domaroŝĉiner-on ja mi ne invitu, Klaŭdio-Oktavianon!

– Ĉesu! – Kim diris, frapinte la tablon per manplato. – Foriru labori, kaj mi ne plu vidu vin ĉi tie dum la labortempo. Ne kolerigu min.

– Fino, – Stojan diris haste. – Punkto. Mi foriras. Sed ĉu vi transdonos?

Li metis la bukedon sur la tablon kaj kuris for, kriante de ĉe la pordo: «Ankaŭ la kloako ekfunkciis denove...»

Kim prenis balailon kaj forbalais ĉion, kio falis de sur Stojan, en angulon.

– Sensaĝa stultulo, – li diris. – Ankaŭ tiu Rita... Nun mi devas ĉion rekalkuli. Subteren ili falu kun tiu amo...

Subfenestre denove irite ekkrakis la motorciklo, kaj denove la sonoj malaperis, nur frapegis la ramo transmure.

– Perek, – Kim diris, – sed por kio vi estis sur la krutaĵo matene?

– Mi esperis renkonti la direktoron. Oni diris al mi, ke li fojfoje gimnastikas ĉe la krutaĵo. Mi volis peti, ke li forsendu min, sed li ne venis. Imagu, Kim, laŭ mi, ĉiuj mensogas ĉi tie. Foje ŝajnas al mi, ke eĉ vi mensogas.

– La direktoro, – Kim diris enpenŝiginte. – Sed tio ja, versimile, estas ideo. Bravulo vi estas. Kuraĝa ideo...

– Tutegale morgaŭ mi forveturos, – Perek diris. – Tuzik min veturigos, li promesis. Morgaŭ mi forestos ĉi tie, sciu do.

– Ja ne supozis mi, ne supozis, – Kim daŭrigis, sen aŭskulti lin. – Tre kuraĝa... Ĉu mi, eble, efektive vin direktu tien – por ke vi ordigu ĉion?